PDF-legilo senpage akirebla

Niaj hejmpaĝoj tre ofte prezentas informojn pere de PDF-dokumentoj, kaj ni en la movado vaste uzas ilin por dissendi kaj ricevi informojn. Tial PDF-legilo certe utilas al aktivaj esperantistoj.

Avantaĝoj de PDF (Portebla Dokument-Formato)

- **Fideleco:** PDF dokumentoj konservas la aspekton de iliaj originaloj, eĉ post distribuo al aliaj operaciaj sistemoj kaj komputikaj ĉirkaŭaĵoj, sendepende de la loke havebla tipografio.
- **Kompakteco:** En multaj kazoj, PDF-dosieroj estas pli kompaktaj ol iliaj fonto-dokumentoj.
- **Sekureco:** Facilas protekti PDF-dosierojn per pasvortoj kaj elektronikaj subskriboj.
- **Komuna redaktado:** La baza dokument-enhavo povas esti frostigita kontraŭ ŝanĝoj, sed helpiloj por komentado kaj tekst-markado faciligas grup-aŭtoradon kaj dokument-akceptigo.

La oferto de Nuance Communications, Inc.

Pluraj kompanioj ofertas senpagajn PDF-legilojn; jen nova oferto de Nuance, multrilate supera al aliaj haveblaj programoj.

Modesta diskospaca postulo: Plene instalita, ĉi tiu legilo bezonas nur 60 MB da diskospaco, kompare kun 200 MB por la plej konata alternativo. La elŝutopezo estas ankoraŭ malpli. Ĉi tiu legilo tamen plenumas praktike ĉiun funkcion kiun ofertas tiu alternativo, plus kelkaj utilaj aldonaj servoj.

Plenskribu kaj savu PDF formularojn: La plimulto de aliaj PDF kompanioj permesas al vi plenskribi, elprinti kaj savi PDF-formularojn nur pere de siaj pagendaj produktoj. Nuance ofertas tion en sia senpaga oferto.

Ampleksa lingva subteno: Ĉi tiu legilo ĝuste vidigos PDF-dokumentojn kreitaj laŭ unikodaj normoj en vasta gamo da lingvoj – inkluzive de Esperanto.

Protektu vian komputilon: Preskaŭ ĉiuj aliaj PDF-legiloj sendemande ebligas funkciadon de *JavaScript*. La legilo de Nuance kontraste kiel liver-normo ne funkciigas ĝin, tiel blokante al hakistoj la eblon ekregi vian komputilon kaj aliri viajn personojn datumojn. Vi povas laŭelekte funkciigi *JavaScript* dum la instalado.

Kompleta respekto de la PDF-normoj: La produkto plene respektas la PDF-normon, ĝis la versio PDF 1.7, do praktike iun ajn serioze pretigitan PDF-dokumenton ĝi kapablos vidigi.

Traktu PDF-pakaĵojn: Estas du specoj da pakaĵo. Unu (angle: *package*) grupigas kelkajn PDF-dosierojn, tiel ke eblas pli kompakte kaj konvene distribui ilin, kiel unu PDF. La dua (angle: *portfolio*) faras samon, sed akceptas dokumentojn kiuj ne estas mem PDF-tipaj kaj ĝi krome ebligas uzon de dosiera (folder) hierarkio. La PDF-legilo de Nuance kapablas malfermi tiajn pakaĵojn, montrante la enhavon kaj permesante al vi eltiri el la pakaĵo unuopajn dokumentojn.

Konvertu PDF dosierojn al Word, Excel aŭ RTF: La legilo inkluzivas aliron al unika senpaga retbazita konverto-servo. Tiu servo momente ne starigas limojn pri nombro da paĝoj aŭ petoj. Alŝutu PDF-dokumenton (sen pasvorta protekto), elektu cel-formaton, donu minimumajn personojn datumojn kaj ret-adreson, kaj vi rericevos per retpoŝto la konvertitan kaj redakteblan enhavon de la PDF.

Momente la produkto estas elŝutebla en ses ekranlingvoj; aliajn oni eble aldonos estonte:

Angla
http://www.nuance.com/imaging/products/pdf-reader.asp

Itala:
http://italy.nuance.com/imaging/products/pdf-reader.asp

Franca:
http://www.nuance.fr/imaging/products/pdf-reader.asp

Hispana
http://spain.nuance.com/imaging/products/pdf-reader.asp

Germana:
http://www.nuance.de/imaging/products/pdf-reader.asp

Nederlanda:
http://netherlands.nuance.com/imaging/products/pdf-reader.asp

Minimumaj Sistembezonoj

- Komputilo kun procesilo Intel® Pentium® aŭ ekvivalento.
- Subtenataj operaciaj sistemoj
  – Windows XP; 32-bita eldono kun ServoPako 3
  – Windows Vista; 32-bita aŭ 64-bita kun ServoPako 1
  – Windows 7; 32- aŭ 64-bita
- Microsoft Internet Explorer 7 aŭ posta.
- 256 MB da memoro (RAM), 512 MB rekomendata.
- 60 MB da libera diskospaco por program dosieroj plus 50 MB da laborspaco dum instalado.
- SVGA monitoro with 256 koloroj, sed prefere 16-bita koloro kun 800 x 600 pikseldenseco.
- Windows-konforma kursormovilo.
- Retaliro bezonata por elŝuto, registrado kaj la dokument-konverta servo.

Pri la kompanio

Nuance Communications, Inc. (ASDAQ: NUAN) estas avangarda liveranto de parol-rekonaj, parol-generaj kaj bildigaj servoj kaj produktoj por entreprenoj kaj klientoj ĉirkaŭ la mondo. Ĝiaj teknologioj, programoj kaj servoj agrabligas la uzanto-sperton tranformante la manieron laŭ kiu personoj interagas kun informoj kaj kiel ili kreas, dividas kaj uzas dokumentojn. Por pliaj informoj, bonvolu viziti: www.nuance.com

© Ĉiuj rajtoj rezervitaj. La dokument povas subiĝi al ŝanĝoj, sen aparta avizo. Laste reviziita: Marto 2011